# KOMUNIKOJ

SPIRITA ELDONA SOCIETO F. V. LORENZ

EVANGELHO - ESPIRITISMO - ESPERANTO

JARO 25-A — OKTOBRO / DECEMBRO 2000 — N-ro 100

## LA SPIRITO DE VERO

La sesa ĉapitro, titolita "La Konsolanta Kristo", de "La Evangelio laŭ Spiritismo", verkita de Allan Kardec, pseŭdonimo de la sciencisto Hippolyte Léon Denizard Rivail, publikigas, sub la subtitolo "Regado de la Spirito de Vero", la jenan mesaĝon:

"Dio konsolas la humilulojn kaj donas al ili la forton, kiun ili petas de Li. Lia potenco kovras la teron, kaj ĉiam apud larmon Li metis ian balzamon. La sinoferado kaj la abnegacio estas senĉesa preĝado kaj enhavas profundan instruon; la homa saĝeco loĝas en tiuj du vortoj. Ĉiuj suferantaj Spiritoj povu kompreni ĉi tiun veron, anstataŭ plendi kontraŭ siaj doloroj, la moralaj suferoj, kiuj estas destinitaj por vi sur la tero. Prenu do kiel devizon la jenajn du vortojn: sinoferado kaj abnegacio, kaj vi estos fortaj, ĉar ili resumas ĉiujn devojn, kiujn de vi postulas la karito kaj la humileco. La sento de la plenumita devo donos al via Spirito ripozon kaj al vi rezignacion. La koro batos pli bone, la animo sereniĝas kaj la korpo ne sentos malfortiĝon, ĉar ju pli profunde atingita estas la Spirito, des pli forta sentas sin la korpo." (La Spirito de Vero. Le Havre, 1863).

## MENSOGEMAJ SPIRITOJ

Literatura revuo, ne scienca, publikigis artikolon pri scienca temo.

La trompo kaj mensogo okazintaj laŭ la dirita artikolo, dum spirita seanco per glaso (jam ne uzata nuntempe, pro la progreso de interkomuniko de la fizika kun la etera mondoj) vere okazas. Ja, tio okazas, kiam partoprenantoj ne estas seriozaj homoj, ne honestaj, ne evoluintaj, ne bone informitaj pri la elementaj postuloj por tia praktikado, postuloj bone konataj de la sciencistoj.

Tial la estraro de Societo Lorenz ne proponas al la membroj fari tiajn eksperimentojn, se ili ne estas bone informitaj per atenta legado de la libroj verkitaj de Allan Kardec: La Libro de la Spiritoj, La Evangelio laŭ Spiritismo, La Ĉielo kaj la Infero, La Genezo kaj precipe, La Libro de la Mediumoj. La antaŭstudado estas nepre necesa, ĉar Spiritismo estas Scienco, kaj ankaŭ Filozofio kaj Religio (Moralo).

La etera (aŭ astrala) mondo estas loĝata de homaj Spiritoj, vivintaj sur la Tero. Do estas bonaj kaj malbonaj Spiritoj, kleraj, kaj stultaj Spiritoj, kiaj estas la homoj loĝintaj sur la Tero. Tute ne ekzistas demonoj, speciale kreitaj de Dio por turmenti la homojn. Dio, la Ĉiopova, la Ĉioscia, Amanta la kreitaĵojn, ne kreis demonojn. Pro antikva kutimo la homoj ankoraŭ parolas pri demonoj (malbonaj Spiritoj) kaj pri anĝeloj (bonaj Spiritoj).

La ĉielo kaj la infero estas en ni mem.

La interesatoj legu kaj relegu la librojn.

## SALUTO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ

Kun granda plezuro mi transdonas miajn plej varmajn bondezirojn al la 85-a Universala Kongreso de Esperanto.

La komenco de nova jarmilo donas al ni unikan okazon por pripensi nian komunan destinon, en momento kiam ni estas interkonektitaj kiel neniam antaŭe. La avantaĝoj de tutmondiĝo estas evidentaj pli rapida kresko, pli alta vivnivelo, novaj ebloj. Tamen ekestis kontraŭaj reagoj, ĉar la distribuo de tiuj avantaĝoj estas tre malegala kaj ĉar la tutmondan merkaton ankoraŭ ne ankras reguloj sur bazo de komunaj sociaj celoj.

La aparta rolo de Unuiĝintaj Nacioj en la nova tutmonda erao devenas el tio ke same ĝia membraro kiel ĝiaj agadkampoj estas universalaj, kaj ke nia Ĉarto esprimas komunajn valorojn. Estas nia tasko certigi ke tutmondiĝo donu avantaĝojn ne nur al iuj sed al ĉiuj; ke paco kaj sekureco realiĝu ne nur por kelkaj sed ĝenerale; ke ebloj ekzistu ne nur por privilegiitoj sed por ĉiu homo ĉie. Pli ol iam ajn Unuiĝintaj Nacioj estas bezonataj por transponti diferencojn inter ŝtatoj rilate al potenco, kulturo, grandeco kaj interesoj — servante kiel la loko kie oni esprimas kaj antaŭenigas la aferon de komuna homeco.

Dum via kunesto en Tel-Avivo, memoru ke ĉiu el ni povas fari ion por ke nia unueca mondo estu pli bona loko, kaj ke ĉiu el ni havas la devon eluzi ĉiujn siajn eblojn. Unuiĝintaj Nacioj povas krei eblojn, sed ĝi ne povas devigi vin uzi ilin. Ĝi povas gardi pacon, sed ĝi ne povas devigi vin alproprigi ĝin. Ĝi povas helpi por trovi vojon al evoluado, sed ĝi ne povas sola laŭiri tiun vojon. Al vi, la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj, apartenas la tasko "kapti la tagon" kaj pleje uzi, por la bono de plej multaj, la eblojn kiujn prezentas tiu ĉi nova epoko. En tiu spirito, mi deziras al vi plenan sukceson. Kofi Annan. Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj.

---

Legu, relegu la respondoj de la Spiritoj per la libroj de Allan Kardec.

K O M U N I K O J
Trimonata bulteno
SPIRITA ELDONA SOCIETO F. V. LORENZ
Direktoro: Délio Pereira de Souza
Sidejo: Rua dos Inválidos nº 34, grupo 903
BR-20231-040 Rio de Janeiro (RJ) - Brazilo
Korespondadreso: Caixa Postal 3.133
BR 20001-970 Rio de Janeiro (RJ) - Brazilo
Telefono: (21)221-2269 - Fakso: (21)508-6758

JARKOTIZO: 40 realoj por Brazilo
25 dolaroj por aliaj landoj.

---

ĈU NOVA ESTRARO?

Laŭ postulo de la statuto la Komitatanoj elektis la estraron por la periodo 15.12.00 ĝis 15.12.03, kun tre malgranda ŝanĝo.

Jen la nomoj de la estraranoj:
Délio Pereira de Souza, Dir. Superintendanto
Edgard Monteiro Machado, Dir. Administranto
Mauro Libânio da Fonseca, Dir. Financisto
Robinson Mattos, Dir. Adjunkto
João da Silva Santos, Dir. Adjunkto.

La enpostenigo okazos en la 15-a de Decembro, vendredo, je la 14-a horo, en la salono de "Lar Fabiano de Cristo", 10-a etaĝo, ĉe strato Inválidos n-ro 34, urbocentro.

Parolos s-anoj Affonso Borges Gallego Soares, pri "Societo Lorenz, la efektivigo de la revo de Prof-ro Ismael Gomes Braga; José Passini, pri "Agado de Societo Lorenz en la Universalaj Kongresoj", kaj Cesar Soares dos Reis, pri "Kunagado de 'Lar Fabiano de Cristo' kaj Societo Lorenz kun Internacia Spiritisma Konsilio.

---

DANKON PRO LA DONACOJ

- S-ino Nury A. Verdes Suarez, Habana, Kubo: Kantoj kaj Romancoj.
- S-ro Aleksas Masiukas, Nurmansk, Rusio: Lumo de Orienta Eŭropo.
- S-ro Bazarnyi Vasil, Krivoj-Rog, Ukrainio: De kie Venis la Malakordoj?, Homo kaj Kosmo kaj Amuza Legolibro en Esperanto.
- S-ro Iser Levin, Ramat-Gan, Israelo: La Esperanta Konjugacio, de Teo Jung, duvoluma; Antologio de la Hebrea Poezio, de J. Konen-Cedek; Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj, de Isai Dratwer.

---

SALUTO DE UNESKO AL ESPERANTA KONGRESO

Kun plezuro mi transdonas korajn salutojn al la partoprenantoj kaj organizantoj de la 85-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Tel-Avivo sub la temo "Lingvo kaj la Kulturo de Paco". Efektive, Esperanto estas lingvo de paco, kreita por forĝi kompreniĝon inter ĉiuj homoj.

Estas ege konvene diskuti pri "Lingvo kaj la Kulturo de Paco" en la jaro 2000, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj Internacia Jaro por la Kulturo de Paco. Unesko vidas lingvon kiel vere la ĉefan rimedon de dialogo, kaj dialogo akcelas interkompreniĝon. Lernado de lingvoj, de lingvoj de aliaj popoloj kaj aliaj kulturoj, estas valora kontribuo al "la laboro por antaŭenigi reciprokan konon kaj interkomprenon de popoloj", kiel difinas la bazajn celojn de UNESKO ĝia konstitucio. Lingvolernado malfermas la pordojn de komunikado kun aliaj kaj prezentas ŝancojn krei novajn ligojn de interkompreno kaj amikeco. Jen ankaŭ la kialo pro kiu lastatempa rezolucio de Interparlamenta Unio alvokas la ŝtatojn kuraĝigi siajn civitanojn lerni lingvojn. Lingvoj, kiel vehikloj por pacaj rilatoj inter la nacioj de la mondo, estas instrumentoj de kulturo de paco nun, kiam tutmondiĝo mallongigas distancojn kaj pliefikigas komunikilojn.

Estas evidente ke por praktike realigi kulturon de paco bazitan sur respekto al la vivo kaj digno de ĉiu homo, sur senperforto, sur kultura diverseco kaj sur dialogo sen fanatikismo, lingvo estas unu el la plej taŭgaj ilon. La fakto ke la lingvo de tiu ĉi internacia kongreso estas Esperanto, atestas pri la bona volo de ĉiuj partoprenantoj el tiom da landoj kaj pri la forto de la Esperanto-movado, kiu ĉiam aktivis por starigi kontaktojn inter diversaj popoloj, kontribuante al internaciaj kompreniĝo kaj paco per forigo de lingvaj baroj.

Mi gratulas Universalan Esperanto-Asocion pro tiu ĉi iniciato kaj, esperante ke la dialogo disvolvota ĉi tie helpos akceli la pacprocezon kaj amikajn rilatojn en tiu ĉi regiono, mi deziras al la Kongreso plenan sukceson. Koichiro Matsuura, Ĝenerala Direktoro de UNESKO.

---

LA MISIO DE ESPERANTO, de Ramatis kaj Atanagildo Spiritoj, mediumo Hercílio Maes, peco de la libro "LA POSTVIVADO DE LA SPIRITO", Jen la ĉapitroj: Antaŭparolo, Esperanto-Akademio kaj ĝia Modela Organizaĵo, La Misio de Esperanto sur la Tero, la Mantroj de la Lingvo Esperanto, La Spirito de Esperanto, Esperanto kaj Spiritismo, Zamenhof kaj Esperanto, 111-paĝa. Mendebla ĉe Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, Caixa Postal 3133, BR-20001-970 Rio de Janeiro-RJ, Brazilo.

- La estraro de Societo Lorenz petas al la membroj ne anoj de UEA, ke ili sendu, kune kun la jarkotizo por la jaro 2001, 8 realojn, (enlandanoj) aŭ 5 dolarojn (la alilandanoj), por aliĝo al UEA kiel individua membro, en la kategorio MG (Membro Gvidlibro). La aliĝo al UEA estas tre grava, ĉar ĉar ĝi bezonas havi altanmembraron.

- La Societo ofertas senpage kolekton de Almanako Lorenz (20 numeroj) por Bibliotekoj.

INFORMOJ AL LA MEMBROJ

- Baldaŭ finiĝos la dudeka jarcento de Kristana Erao kaj komenciĝos la dudek-unua jarcento. La homo vivas dum gravaj krizoj, financa, kaj la plej grava, la morala. Ĉio okazas, ĉar la homoj ne obeas la instruon de la Kristo: amu vin reciproke, ĉar vi estas fratoj, filoj de la sama Patro; kaj ankaŭ ne obeas la dekalogon de Moseo: ne mortigu; honoru vian patron kaj vian patrinon, ne deziru la havaĵojn de via proksimulo. Kion fari? La religianoj preĝu, preĝu ĉiutage, preĝu ofte dum la tago, sed unue rigardu vin; forlasu la malvirtojn kaj plifortigu la virtojn, kaj nepre amu la gefratojn, eĉ la pekintojn, la malbonulojn.

- La Societo, kun la aprobo de la Komitato vendis la eksan sidejo en Petropolo, tial la Fonduso Zamenhof de nun utiliĝos por aĉeto de Oficeja Ilaro, precipe alia komputilo.

- Jen aperis Almanako Lorenz 2001 pri Spiritismo: scienco, filozofio, religio. La prezo estas 3 dolaroj aŭ 3 eŭroj, mendebla ĉe UEA kaj Societo Lorenz.

- La societanoj rajtas peti al la Societo kopion de Kongresa Rezolucio de la 85-a U.K.

- Novaj eldonoj kaj reeldonoj en jaro 2000: Cartilha de Esperanto, 2-a eldono; A Força do Amor, 2-a eldono; O Raio de Sol Curioso, 3-a eldono; O Tunel do Tempo, 2-a eldono; Verda Signalo, 2-a eldono; Canção Tagoriana, 1-a eldono; Um Caso de Reencarnação, 1-a eldono; Penso kaj Vivo, 1-a eldono; Cartilha de Esperanto - Complemento, 1-a eldono; O Paradigma da Humanidade, 1-a eldono; Almanako Lorenz 2001.

- Suami Vivekananda estas simbolo! La saĝa hinda filozofo ravis la asembleon ĉe Kongreso de Religioj, en Ĉikago, Usono, en la jaro 1893, kiam li antaŭ la kongresanoj ekkriis: Mi konis Dion kaj konis la veron!

- Rezolucio de la Unua Seminario por Arabaj Esperantistoj: Al-voko kaj pro-voko de Amano. Se vin interesas la rezolucio, petu al Societo Lorenz kopion el la revuo Esperanto, de Septembro 2000, paĝo 146.

---

HOMEOPATIO POPULARA - dulingva, de D-ro Izao Carneiro Soares, 95-paĝa, mendebla ĉe Societo Lorenz. R$ 8,00 por enlandanoj.

RELIGIA LITERATURO EN ESPERANTO, de Karl-Olof Sandgren, kun 132 religioj, 134-paĝa. R$ 8,00 por enlandanoj.

O PARADIGMA DA HUMANIDADE, romano, de Conde J.W. Rochester, mediumino Arandi Gomes Teixeira, 359-paĝa. R$ 17,00 por enlandanoj. Ĉiuj mendeblaj ĉe Societo Lorenz.

KION FARAS NIAJ AMIKOJ

- Profesorino Elvira Fontes ricevis la titolon pri Honora Membro de U.E.A. La estraro de Societo Lorenz gratulas la samideaninon, ĉar ŝi meritas la titolon pro ŝia senlaca laborado por instruo de Esperanto, reprezenta nuntempe ILEI en Brazilo.

- En artikolo de Giovanni Scognamillo la gazeto SEI - Spiritisma Esperanto-Informilo publikiĝis sur n-ro 110 informon pri la reenkarniĝo de la muzikisto Puccini kun la nomo Puccini. Petu senpagan ekzempleron.

- S-ano Saulo Salgado Wanderley instruas Esperanton en la Generalstabo de Milita Polico de Ŝtato Rio-de-Ĵanejro, en la urbocentro. La kurso utilas al la policistoj.

- D-ro Juvanir Borges de Souza partoprenis la Renkontiĝon de la Tutmonda Kupolo de Religioj kaj Spiritaj Gvidantoj por la Tutmonda Paco.

- FILOZOFIA REVUO SIMPOZIO publikigas sur la n-ro 35, Majo 2000, informon pri tio, interkonsento de Kultura Fondaĵo Simpozio kaj Sciencoj de San Marino pri ambaŭflanka kunlaboro, cele al starigo de filio en Brazilo.

- Zagreba Banko, en Kroatio, subvencias ĉiujare ses projektofakojn. La ĉijaran subvencion en la fako Junularo ricevis Kroata Esperanto-Ligo, por projekto pri partopreno de junaj esperantistoj en la 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo.

- La revuo REFORMADOR proponas al ĉiu esperantisto la abonon por informiĝo. Skribu al REFORMADOR, Rua Souza Valente 17, 20941-040 Rio de Janeiro (RJ). Tel. 589-6020.

- La Irlandanoj riverencas la saman Jesuon, la Kriston, kial do ili interbatalas inter si? Se ili amas la saman Majstron, Jesuon, kial ili ne amas sin reciproke?

- Parolis Jesuo: 'Mi ne estas nur la simbolo de l' bono, sed la konstanta kaj konkreta ĉeesto, vin senĉese prigardanta. El "O Paradigma da Humanidade", portugallingva, paĝo 350, linioj 14-a kaj 15-a.

---

ERARO EN LA TRADUKO DE NOVA TESTAMENTO

JOÃO FERREIRA DE ALMEIDA - Bemaventurados os humildes <u>de</u> espírito, porque deles ...

HUBERTO ROHDEN - Bemaventurados os pobres <u>pelo</u> espírito, porque deles ...

ESPERANTO, el grupo de pastoroj - Feliĉaj estas la malriĉaj <u>en</u> spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.

El "LA PREDIKO SUR LA MONTO", ĉiuj tradukitaj el la greka lingvo, la originalo.

AMO - PACO - LUMO - estas la devizo de la Societo Lorenz, kaj ĉiu societano devas realigi en si la devizon. Jesuo diris dum la Prediko sur la Monto: Vi estas la lumo de la mondo. Urbo starigita sur monto ne povas esti kaŝita. Kiam oni bruligas lampon, oni metas ĝin ne sub grenmezurilon, sed sur la lampingon; kaj ĝi lumas sur ĉiujn, kiuj estas en la domo. Tiel same via lumo lumu antaŭ homoj, por ke ili vidu viajn bonajn farojn kaj gloru vian Patron, kiu estas en la ĉielo." (Evangelio laŭ Mateo, 5:14/16).

---

PATRINA AMO RESANIGAS LA FILON

En la jaro 1995 la ĵurnalo "Globo" informis, ke en la urbo San-Francisko, Usono, la amerikano John Martin, 21-jara, kelkajn minutojn antaŭ la decido de la kuracistoj elŝalti la aparaton, kiu tenis lin vivanta dum dek tagoj, li vekiĝis el la komato, aŭdinte la patrinon diri: "mi amas vin, filo". Subite li malfermis la okulojn, karesis sian hararon, kaj murmuris: "mi ankaŭ amas vin, panjo".

John estis batfalinta per aŭtomobilo, en la 2-a de Februaro, antaŭ la hotelo, kie li laboradis, en San-Francisko. Dum dek tagoj li estis dufoje operaciita je la cerbo, por eltiri koagulon. La patrino de John, Julia Kristina nur permesis la eŭtanazion post la informo de la kuracistoj pri tio, ke ne plu ekzistas espero pri resanigo de la filo. En la sekvinta tago, kiam John forlasis la komaton, la samaj kuracistoj diris, ke post ses monatoj li ĝuos normalan vivon.

- El "Correio Fraterno do ABC", Julio 2000.

---

LEGENDO PRI WARS KAJ SAWA

En tiu loko, kie hodiaŭ estas la Urboplaco de la Malnova Urbo, iam kreskis grandega arbaro. En tiu arbarego ĉasis princo, aŭ reĝo, nomita Kazimiro. Iufoje li perdis la ĝustan vojon. Jam krepuskiĝis, kiam - serĉante ian ajn azilon - Kazimiro atingis altaĵon ĉe iu granda rivero. Tiu rivero estis Vistulo.

Tre ekĝojis la devojiĝinta reĝo, kiam li ekvidis malgrandan dometon. En ĝi Kazimiro renkontis virinon, kiu ĵus naskis ĝemelojn, geknabojn. En la dometo la citita princo savon trovis kaj la patrino de la ĝemeloj ankaŭ profitis la renkontiĝon kun la reĝo. Kazimiro fariĝis baptopatro de ŝiaj infanoj; dum la ceremonio la knabo ricevis la nomon Wars kaj la knabino - Sawa.

Baldaŭ la familio riĉiĝis kaj konstruis pli grandan domon. Poste, apud la domo de la geknaboj Wars kaj Sawa aperis aliaj konstruaĵoj, kreiĝis vilaĝo, kiun memore al la okazintaĵo, oni nomis Warsawa kaj poste Warszava (nun Varsovio).

TIEL PAROLAS LA MAJSTRO

De tempo al tempo aperas sur la tero homoj kun granda spirita sperto. Ili estas lumegoj kaj pioniroj de la homaro.

Tiuj homoj atingis altan nivelon de konscienco pri la Nevidebla Mondo, ili scias tion, kion la aliaj apenaŭ kredas, aŭ eĉ ne kredas. Iliaj paroloj ne spruĉas el konscia kompreno aŭ volo, sed ili estas la spontana kaj nerezistebla elverŝo el ilia esto, el ilia interna pleniĝo.

La plej fame konata spiritmajstro de la okcidenta homaro estas "Kristo". Li manifestiĝis ĉi tie sur la tero en la homa persono de Jesuo Nazareta, filo de Virgulino Maria.

Unu el la plej gravaj eraroj de niaj eklezioj teologoj estas, ke ili identigas la Kriston kun Jesuo - kontraŭe al la fakto ke li mem ĉiam manifestis klaran distingon inter Kristo, la "Solenaskita Filo de la Patro", kaj lia homa estaĵo, Jesuo Nazareta.

Antaŭ la spiritaj ĉefoj de la sinagogo li jesas, ke Kristo estas "Sinjoro de David", dum Jesuo estas filo aŭ ido de David.

Li jesas, ke la Kosma Kristo ekzistis antaŭ ol Abraham, kaj la Surtera Kristo en Jesuo aperis sur la tero post 2.000 jaroj.

Ĉe la lasta vespermanĝo li petas al Dio, ke lin gloru per tiu gloro, kiun li havis antaŭ ol la mondo ekzistis.

La Kosma Kristo estas, laŭ Johano, la aŭtoro de la kvara Evangelio, la Vorto, kiu en la komenco estis kun Dio, kaj per kiu ĉio ekestis.

Laŭ Paŭlo el Tarso estas la Kosma Kristo, la "unuenaskito inter la tuta kreitaro", tiel sur la videbla mondo, kiel sur la nevidebla, antaŭa al ĉiuj homoj kaj anĝeloj, ĉar "el li kaj per li kaj al li estas ĉio".

Tiu Kristo diras pri si mem, ke post lia foriro el ĉi tiu mondo li estos kun ni "ĉiujn tagojn ĝis la maturiĝo de la mondaĝo", kaj li plie diras; "kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili".

Li jesas plurfoje, ke ĉio estas ebla kaj nenio estas neebla al homo havanta fidon (latine fides), t.e. fidela al la spirito de Kristo, kaj ke tiu homo reale neniam mortos, eĉ se li estas fizike mortinta; do, vivos por ĉiam.

Nu, la renkonto kun nia dia Mio, kiun la Kristo nomas la "Patro en ni", ni starigas tiun fidelecon aŭ sintonizon kun la spirito de la Kosma Kristo, nia Interna Kristo.

"La Patro estas en mi, kaj mi estas en la Patro" - la Patro estas en vi, kaj vi en Li.

Per la parabolo pri la vinbertrunko kaj ĝiaj branĉoj li komprenigas, ke la suka vivo, kiu cirkulas en la trunko, estas: la Kristo, kaj tiu en la branĉoj la homoj. Kaj li konkludas: "Kiu restadas en mi, kaj mi en li, tiu donas multe da frukto."